

NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

JULIO-AŬGUSTO 2008

Bedaŭrinde la Madrida Urbodomo neis al Madrida Esperanto-Liceo la du petitajn subvenciojn. La unua estis por partopreno en la Kongreso de Cuenca: oni neis ĉar la aktivaĵo ne okazas en Madrido. La dua por aĉeti libro-ŝrankon por la Biblioteko de MEL: oni neis ĉar la ŝranko ne estas por konkreta aktivaĵo.

EN HISPANIO

La numero je printempo 2008 de la kultura revuo "Kaleidoscopio" inkludis unu paĝon kun la reklamo de UEA por la internacia tago pri lingvoj. La teksto, en la hispana, estis sendita de Wolfgang Günther.

La revuo "La Clave" kiu direktas Balbín, publikigis en sia numero 371 (23-29 majo) du paĝan artikolon pri Esperanto: "Año de las Letras: el esperanto tiene su espacio". HEF donis informojn al la aŭtorino.

Universia, la reta ĵurnalo pri universitatoj publikigis (2008-06-17) artikolon pri Miguel Sancho Izquierdo, rektoro de la Universitato de Zaragoza dum kelkaj jaroj kaj iama HEF-Prezidanto.

Manolo Pancorbo estis intervjuita de Radio Nacional (RNE)

La katalunlingva gazeto "Quadern" pri ideoj, arto kaj beletro, en n-ro de februaro 2008, intervjuis al J.Mª Galofré. La raporto bone diskonigas esperanton.

ESPERANTA MONDO

Dank'al la afabla helpo de la Direkcio de la Regiona Trajna Kompanio en Bjalistoko, laŭ la propono de ties Urbestro, kun la financa subteno de la Marŝalo de la Podlaĥia Vojevodio, en la somera horaro ekestis la **trajno ZAMENHOF**. En la trajno estos disdonitaj flugfolioj pri Esperanto kaj Bjalistoko kaj per la trajna mikrofono Ludoviko rakontos al vojaĝantoj pri la ideo kaj la lingvo universala. La evento okazas sub la media protekto de la TV Bialystok kaj la televidkanalo TVN.

La reta enciklopedio **Wikipedia** atingis la 100.000-an artikolon en sia versio en Esperanto. Aliru al ĝi en <http://eo.wikipedia.org/>

En ĉinlingva filmeto prenita el la ĉina TV aperas inter aliaj nia kara **Augusto Casquero**.

"Doctor Zamenhof": **Hispanlingva romaneska biografio pri Zamenhof** verkita originale en pola lingvo far Maria Ziółkowska, tradukita en Esperanton far Isaj Dratwer, kaj el Esperanto en hispanan far Nájera Castaneira: oni povas ĝin elŝuti libere en la reto <http://luisguillermo.com/doctoresperanto>

La **pola parlamento** jaŭde la 12-an de junio unuanime per 397 voĉoj aprobis rezolucion, kiu omaĝas la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio kaj donas sian subtenon al la kandidateco de UEA por la Nobel-premio pri paco. Laŭ la parlamento, temas pri omaĝo al la daŭrigantoj de la verko de Ludoviko Zamenhof, kiu "kreante la lingvon Esperanto deziris certigi al ĉiuj homoj la eblecon de reciproka kompreno kaj interkompreniĝo sendepende de la nacieco, raso, religio kaj propraj mondkonceptoj". La rezolucio ankaŭ konstatas, ke "Esperanto ligas homojn en riĉa kaj valora kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco". Tial la pola parlamento opinias, ke UEA ricevu Nobelan pac-premion: "La Sejmo, dezirante omaĝi la kontribuon de d-ro Ludoviko Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo subtenas la klopodojn de internaciaj medioj, ke UEA estu honorita per la paca Nobel-premio".

La Eŭropa Komisiono aprobis **tradukprojekton de infanlibroj** en kiu esperanto rolas kiel pontolingvo. EU fincos per 64.000 € la projekton (2008-2010) en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj kaj poste distribuitaj en elementaj lernejoj.

KONGRESOJ KAJ RENKONTIGXOJ

26 julio- 2 aŭgusto. Internacia Junulara Kongreso (TEJO) Szombathely (Hungario)
4-11 oktobro. 16-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Salou (Tarragona)

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Dum la Ĝenerala Kunsido de Cuenca oni elektis jenan **novan estraron** por 2008-2012:

Prezidanto: Arturo Jiménez
Vic-prezidanto: Pedro Hernández Úbeda
Sekretario: Félix Jiménez Lobo
Voĉdonanto- Boletín: Angel Arquillos
Voĉdonanto HEJS: Miguel Hernández
Voĉdonanto: Juan Trenado

La 67-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO okazis inter la 3-a kaj 6-a de julio de 2008 en la urbo Cuenca. Ĝia moto estis "Lingvoj, trezoro de la homaro, ilo por dialogo". Aliĝintoj: 85

Agado de HEF: Paĝaro (Miguel Angel Sancho), Biblioteko (Ana Manero), Projekto 2007/2008, (Toño del Barrio)

Prelegoj: "Esperanto kiel literatura lingvo" (A. Valén kaj Miguel Fernández). Ateliero de poezio (Jorge Camacho). "100 jaroj de la zaragoza E-grupo Frateco" (Lorenzo Noguero). "La akvo kiel fonto de konfliktoj" (R. Urueña), "Ĉinio" (A. Casquero). "Cigana Romancaro" (M. Fernández)

Aliaj: Prezento de novaj libroj (Miguel Gutiérrez Adúriz, Jorge Camacho). Kurso de esperanto, malfermita al la ĝenerala publiko de la urbo (Pedro Hernández). Libroservo (Pedro Sanz).

La Kongreso de la jaro 2008 estis speciale malfermita al la ekstera publiko, kongrue kun la spirito de la Internacia Jaro de la Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj.

Oni devas danki al Alejandro Pareja kiu okupiĝis pri la organizado kaj trovis malmultekostan loĝejon, centran kongresejon kaj atingis gravan subvencion de Caja Castilla-La Mancha: dank'al tio la kongresanoj ricevis diversajn donacojn (T-ĉemizo kaj la libro "Tirano Banderas"). Miguel G. Adúriz okupiĝis pri la programo kaj, kiel membro de la iberia grupo de E-aŭtoroj, altiris la aliajn membrojn por partopreni en la programaro. La esperanta nivelo de la kongresanoj estis unu el la plej alta de la lastaj jaroj.

FELIĈAN SOMERON KAJ ĜIS SEPTEMBRO!!!

Ĝis la 15-a de septembro ne okazos nia konversacia rondo.

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid